

Pedagogia Tago de la hungara ILEI-sekcio

Tute plena ĉambro da kolegoj kuniĝis en Budapeŝto el ĉiuj partoj de la lando en la 2a de aprilo, 2011 – ĉ. 45 partoprenintoj el kiuj 29 membroj de la hungara sekcio, sekve okazis kadre de la tago kvoruma jarkunsido. Valora kaj intensa faka programo disvolviĝis - kies plimulto rilatis al la unika ekzamena situacio en Hungario – tio altiris multajn kursgvidantojn, ĉar iliaj ŝancoj liveri sukcesintojn dependas forte je bona informiteco pri la postuloj kaj proceduroj. La programo inkluzivis tute praktikajn ekzercojn kiuj engaĝis ĉiujn partoprenantojn.

Partoprenis kaj salutis la kunvenon la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), s-ino Judita Rey-Hudeček, cele al proksimigo de rilatoj kun Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) kaj la hungara ILEI-sekcio (EPME) pri fortigo de la enlanda instruado en Kroatio kaj intensigo de translimaj kontaktoj inter la najbaraj landoj, kiuj tradicie estis bonaj kaj meritas refortigon.



En unu programero, la nove aperinta libro "Temagemo" de Judit Felszeghy estis prezentita de la prezidanto de ILEI. En la supra foto ili sidas ambaŭflanke de la sekiestro de EPME, Jozefo Németh – la spontane aranĝita grupfoto okazis ĵus antaŭ tiu programero. La lernolibro ja utilas por aktivigi la parolkapablon de ekzamen-kandidatoj, sed havas kroman avantaĝon, ke ĝi estas pure Esperantlingva verko. Recenzo atendeblas en "Internacia Pedagogia Revuo" (IPR). La prezenton faris la internacia ILEI, ĉar nia ligo dum pluraj jaroj maturigis la verkon por aperigo, sed fine alia eldonejo transprenis la taskon. Similo okazis pri la lernpakaĵo de Josias Barboza el Brazilo (vidu recenzon en IPR 2011/1), kiu ricevis koncizan sed laŭdan prezenton, kiel same "Detala Gramatiko de Esperanto" de Bertil Wennergren (eldonita de ILEI kaj E@I) kaj la "Manlibro pri la Instruado de Esperanto".

Kelkajn minutojn fine de la prezentaĵo ni dediĉis al lastaj novaĵoj de la internacia ILEI, kun iom da demandoj, precipe pri la ebloj de la unujaraj instruisto-trejnaj kursoj en Poznano (Pollando) liveri atestilon, kiun hungara lernejo akceptus. Temo, kiun ni sekvos!

Dum la jarkunsido de EPME okazis elekto de nova estraro por la sekva tri-jara periodo. ILEI aparte laŭdis la fakton ke akceptis proponiĝon ok kandidatoj por la kvin lokoj – proponemo malofte spertata en niaj rondoj. Jen la elektitaj estraranoj en alfabeto vicordo:

Kovács Márta
Kovács Katalin
Németh József
Salomonné Csiszár Pálma
Sereghyné Zengő Enikő

ILEI gratulis la elektitojn, kaj instigis al la neelektitoj tamen ludadi aktivan rolon ene de la sekcio, aŭ eĉ je internacia skalo.

Jen la programo de la tago:

- 10.00-11.00 Laboratoriaj taskoj -- aŭdkapablo en la praktiko (difino de la niveloj, diskonigo de statistiko, auskultado de teksto, solvo de taskoj). Preleganto: S-ro Dániel Lariko Golden
- 11.00-12.00 Preparo de taskoj por la ekzamenero 'kompreno de la parolata lingvo'. Preleganto: S-ino Márta Kovács
- 12.00-13.00: EPME jarkunsido (kun estrar-elekto – kaj sandviĉoj)
- 13.00-13.45 Prezentado de lernolibro por progresantoj de Judit Felszeghy TEMAGEMO – Preleganto: Stefan MacGill. La aŭtoro respondas al eventualaj demandoj.
- 13.45-14.30 „Sen instruado Esperanto ne ekzistus” (raporto pri la univertitataj kursoj en Poznano). Preleganto: Szabolcs Szilva
- 14.30-15.15 Gramatika pliperfektigo (refleksivaj pronomoj). Preleganto: Blazio Vaha

Raportis:

Stefan MacGill
Prezidanto, ILEI